

Kolokvo pri la adapto de UN al la hodiaŭa mondo
okazinta en Nico (Sudfrancio) la 27/29-ajn de majo 1965, 9-a parto
Claude Gacond, 149-a radioprelego, 1966.08.10 & 1966.08.13

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Hodiaŭ finiĝas nia preleg-serio dediĉita al la Nica Kolokvo okazinta en majo de la pasinta jaro. Kiel vi rimarkis, tiu kolokvo donis vastan kaj kuraĝan priskribon de la hodiaŭaj mondproblemoj. Montriĝis, ke la krizon de Unuiĝinta Naciaro ne kaŭzas juraj mankoj, sed moralaj mankoj. La membro-ŝtatoj de UN ne plenumis siajn promesojn. Ili eĉ ne subskribis la paktojn, kiuj estus permesintaj kontroli la observadon de la Homaj Rajtoj. Tiu sinteno, malhelpa al UN, fine ankaŭ malhelpas la ŝtatojn mem. Ĝi atestas moralan malhonestecon.

A.- Ni rimarkis, ke gravaj klaŭzoj de la Ĉarto de UN neniam estis efektivigitaj. Anstataŭ uzi ĉiujn jurajn eblojn por malebligi eventualajn konfliktojn la ŝtatoj preferis paralizigi la agadojn de UN. Nur kiam milito grave endanĝerigas la mondan pacon, tiam la ĝenerala sekretario ricevas la permeson interveni. Tiu politiko pruvas denove moralan malhonestecon. Ĝi respiegulas ŝovinisman kondutaron.

Cl.- La kaŭzo al tiu sinteno de la registaroj estas la dogmo de la absoluta suvereneco de la ŝtatoj. La diplomatoj, kiuj renkontiĝas en la koridoroj de la Manhatan-Palaco en Nov-Jorko almenaŭ interkonsentas pri io: ke la ŝtatoj estas absolutaj en si mem kaj ke UN ne rajtas interveni en la naciajn vivon.

A.- Tiu dogmo mortigis Ligon de Nacioj. La konsekvenco estis la dua mondmilito. La homoj ne volas ripetadon de tiu procezo. Tial ili esprimas tiun volon pere de fondo de miloj da plej diversaj mondorganizaĵoj, kiuj reprezentas hodiaŭ veran publikan opinion. La diplomatoj en UN ne plu povas blinde obei la registarajn ordonojn, ili ankaŭ devas atenti al la neregistaraj influoj. Jen certe granda ŝanĝiĝo inter la situacio de la tiama Ligo de Nacioj kaj tiu de la hodiaŭa Unuiĝinta Naciaro.

Cl.- La mondfederalistoj defendas la ideon, ke apud la Asembleo de UN devus funkcii Parlamento de la Popoloj, kiu esprimus la volon de la popoloj. Ili nun sentas, ke la mondevoluo eble ne iras en tiun direkton. La internacia integrado ne necese imitas la procezojn, kiuj naskis la naciojn. La internacia vivo ŝajnas evolui laŭ propra direkto.

A.- Naskiĝis dum nia jarcento miloj da plej diversaj mond-organizaĵoj, kiuj iom post iom reprezentas la plej diversajn homajn okupojn. La sekretarioj kaj prezidantoj de tiuj movadoj personigas vastan organizitan publikon. Iliaj funkcioj fariĝas ĉiujare pli oficialaj, ĉar ili esprimas la volon al vera monda integrado, al interpopola paca kunvivado.

Cl.- Siaflanke la registaraj diplomatoj devas blinde obei al la ordonoj de sia registaro, eĉ se tiu ordono malfavoras interregistaran pacan kunvivadon. Ili reprezentas nur naciajn egoismon. La estroj de la neregistaraj mond-organizaĵoj ne estas la sklavoj de unu sola nacio. Ili reprezentas supernacian fakan opinion. Ju pli ili kuraĝe esprimas sian propran opinion, des pli ili sentas sin apogataj de la societanoj, kiujn ili reprezentas. La kontraŭo okazas por la naci-delegitoj. Ju pli ili kuraĝe esprimas propran opinion, des pli rapide ili perdas sian diplomatan funkcion.

A.- Apud UN naskiĝas do speco de monda forumo. La monda integrado efektiviĝas laŭ la revo de la anarkiistoj. Ne formiĝas unu parlamento, sed tiom da parlamentoj, kiom da fakoj kaj idealoj.

Cl.- Eĉ UN evoluas en tiun direkton. Ĝi estas ĉirkaŭata de dekoj da fakaj interregistaraj organizaĵoj, en kiuj efektiviĝas la konstrua laboro. Kelkaj fariĝas ĉiutaga realaĵo. Ni pensu al Unesko, al la Labor-Oficejo, al la organizaĵoj pri telekomunikado, pri mono, pri ekonomio,

Kolokvo pri la adapto de UN al la hodiaŭa mondo
okazinta en Nico (Sudfrancio) la 27/29-ajn de majo 1965, 9-a parto
Claude Gacond, 149-a radioprelego, 1966.08.10 & 1966.08.13

pri agrokulturo, pri sano. Ili grupigas fakulojn kaj iliaj decidoj ŝanĝas ofte la naciajn kutimojn.

A.- Ju pli tiuj fakaj organizaĵoj kreskas, des pli malkreskas la povoj mem de la politikistoj. Oni eĉ divenas malkreskon de UN mem profite al la kresko de ĝiaj fakaj organizaĵoj.

Cl.- Antaŭ dudeko da jaroj tiu evoluo ne ankoraŭ estis sentebla. Hodiaŭ ĝi fariĝas okulfrapa realaĵo. Ni konstatas, ke kiam pluraj organizaĵoj paralele esprimas la samajn emojn, ili iel federaciigatas por iom post iom formi unu solan movadon. Kontraŭe, kiam en unu sola organizaĵo kunvivadas pluraj emoj, sub-organizaĵoj formiĝas. Iom post iom ili sendependiĝas de la patrino. Mondskale kreiĝas organismoj por ĉiu homa fako.

A.- La hodiaŭa homo ne plu apartenas sole al sia nacio. Li estas ankaŭ ano de mem-elektitaj supernaciaj societoj laŭ siaj okupoj kaj filozofiaj orientiĝoj. Ĉar la monda integrado tuŝas ĉiam pli da fakoj, ĉiam pli da homoj sentas sin dividitaj inter du societoj : la nacia societo, kiu ne estas elektita, kaj la fakaj mondaj societoj, al kiuj li apartenas. Kiam ambaŭ societoj konfliktas, tiam decido devas interveni : « *Al kiu mi restos fidela ?* » Pli kaj pli la homoj fidelas al la mondaj societoj, kiuj simbolas la estonton.

Cl.- Ĝis nun la monda civitaneco sin trudis malpliforte, ol la naciaj civitanecoj. Sed dua mondmilito kaj la absurdeco de la armada konkuro senbriligas la naciajn tradiciojn. Kontraŭe la teknika progreso, la demografia kreskado kaj la akriĝo de la mondaj problemoj turnas la homajn rigardojn al la monda vivo.

A.- En konflikto inter la naciaj kaj mondaj ecoj venkis la naciismoj ĝis meze de nia jarcento. De nun pli kaj pli ofte venkas la mondo. Jen pli kuraĝiga garantio por la paco, ol la atom-armiloj.

Cl.- Tiu ŝanĝiĝo kuraĝigas la reprezentantojn de la mondaj organizaĵoj esprimi ĉiam pli vigle kaj klare sian homaranismon. La Nica Kolokvo tion pruvis plian fojon. Kaj la registaroj devas ekaŭdi.

A.- Verŝajne la vojo al vera monda integrado estos ankoraŭ longega. Tamen ĝi kondukas nin hodiaŭ al videjoj, kiuj ebligas imagi, kio estos tiu integrado. Tiu fenomeno nur povas ĝojigi la esperantistaron. Esperantujo, de utopio, fariĝas realaĵo, ĉar ĝi estas unu el tiuj mondstrebadoj. Sed ĝi ne trovis ĝis nun konvenan manieron sin aŭdigi kadre de la mondaj organizaĵoj.

Cl.- Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-